Izabelado

de

Gunnar Gällmo

Ŝi vundas kiel rozoj povas vundi,
ne, kiel diras multaj, per la dornoj.
Per sia rozo vundas ĉiam rozo
kaj tiu vundo iĝas dornovundo,
sed eble eĉ pli forte ia vundo
de nura belo, nura belofajro.

Harry Martinson: *Aniaro*,
trad Bertil Nilsson kaj William Auld

© Gunnar Gällmo 2006, 2008

Pliaj ekzempleroj de la libro mendeblas ĉe
http://www.lulu.com/gunnargallmo

Staras mi ĉe via tombo –
vent’ susuras, voĉoj vokas –
kaj memoras mi la tagojn,
longe for, de nia amo.

Volus mi, Orfe-simile,
en Hadeson subeniri
por per kanto
revenigi vin ĉimonden.

Volus kiel Hermod rajdi
en la landon de mortintoj
por Balduron revenigi.

Volus, kiel bravpatrino
de la finna Lemminkäinen,
serĉi lagon Tuonelan,
rekolekti ĉiujn erojn
de l’ anim’ kaj korpo viaj
kaj en ilin vivon verŝi.

Sed mi ne orfean liron
majstras ludi. Nek mi povus,
se revidus mi vin inter
la mortintoj, brave turni

mian dorson. Nek mi certas
ĉu vin mia kanto logus,
aŭ ĉu eble vi preferus
inter ombroj daŭre resti.

Nek mi scias kie serĉi.

Kien iris vi postmorte,
ho amata, mia kara?
Ĉu al altaj dioj,
al anĝeloj piaj?

Mi esperas, sed ne kredas.

Kun kruelo papilia
vi formikon al vi ligis,
poste mem libere flugis,
dum ĉe vojo la formiko
disŝirite, senespere
provis sekvi.

Tia papilia flugo
ne anĝela flugo estas.

Ĉu vi inter homoj ree
naskon trovis? Eble, eble,
sed ne certe. Tro da taskoj
ne ankoraŭ plenumitaj
vi postlasis.

Ĉu vi en la besta mondo

renaskiĝis? Mi ne kredas.
Tro homeca vi ja estis,
nek anĝela, nek demona,
nek bestece kulplibera.

Ĉu vi al infero iris?
Ja ne eblas. Senkompate
agis vi dum certaj horoj,
sed tenere dum aliaj.
Tro miksita estis vi por
en infera mondo hejmi.

Ĉu do inter la fantomoj?
Ĉu vi eble ne ankoraŭ
povis el ĉi mond' forflugi,
kvankam via korp' ne vivas,
en la tomb' disfalas lante?

Ĉu en mond' malsatspirita
vi nun estas,
kie la loĝantoj daŭre
havas ligon al pasinto,
ne de ĝi foriri povas,
kaj ne povas reeniri?

Se vi estas tie, kara,

ĉu antingas vin la pensoj,
ĉu karesas vin la amo
kiun vi en homa vivo
fine ne plu volis havi?

Staras mi ĉe via tombo
kaj silentas tomboŝtono.

En Rio li unue vidis ŝin, inter novaj geamikoj, dum antaŭkongresa rondvojaĝo survoje al Braziljo kaj la UK 1981. Dum amikeca vespermanĝo li apenaŭ kuraĝis rigardi ŝin; tro bela ŝi estis, kaj dek trijarojn pli juna ol li.

Li ne esperis pri ŝi.

Dum la kongreso li ofte sidis kaj promenis kun la novaj brazilaj geamikoj, inter ili ŝi. Li rigardis aliajn knabinojn, malpli belajn, eble malpli neatingeblajn.

Post la kongreso li skribis al kelkaj el tiuj geamikoj. Respondis nur ŝi.

Jes, ĝuste li interesis ŝin. Jes, ĝuste kun li ŝi volis komunikadi kaj interrilati.

Miraklo.

Ilia rilato iĝis ĉiam pli varma. Ilia korespondado iĝis kor-respondado, el amikeco naskiĝis amo.

Interalie iliaj literaturaj interesoj kunigis ilin – ŝi atentigis lin pri la verkaro de Fernando Pessoa, en originalo (li iom komprenis la ĉefajn latinidajn lingvojn), li ŝin pri tiu de Harry Martinson.

Precipe pri Aniaro, en la esperanta traduko de Nilsson kaj Auld:

Kiam l' amata mortopordon venas
la spac' kruela pli severmienas.

Tiel en Aniaro, 89a kanto, pri Isagela; kaj lia adorata nomiĝis Izabel. Sed tiuj vortoj tiam ne ankoraŭ aktualis.

Same ne la vortoj en la 19a kanto:

Ŝi vundas kiel rozoj povas vundi,
ne, kiel diras multaj, per la dornoj.
Per sia rozo vundas ĉiam rozo
kaj tiu vundo iĝas dornovundo,
sed eble eĉ pli forte ia vundo
de nura belo, nura belofajro.

En Antverpeno la postan jaron li denove renkontis ŝin, finfine. Post unu jaro da korespondado, ĉiam pli varmiga por ili ambaŭ; unu jaro da amikeco, kondensiĝante al amo; unu jaro da sopiro, aŭ da saŭdado, por uzi la esprimon de ŝia kulturo (kaj ŝi ofte tiel esprimis sin en siaj leteroj); nun finfine...

La interkona vespero de tiu kongreso ekhavis por ili tute apartan signifon. Por momento ili kune forlasis la homamason kaj iom vagadis apud la kongresejo tra la zoologia ĝardeno, en kiu la kongresanoj povis senpage eniri.

Sed la bestoj ne interesis ilin. Je la oka horo, ili sidiĝis sur benko kaj rigardis unu la alian. Post tiu rigardo, jam estis la deka.

En ŝia brakumo li sentis sin hejme. Interhoma vespero.

La dimanĉo same esperige pasis, kaj la lundo, kaj la marda antaŭtagmezo. Marde tagmeze, ŝi proponis ke ili ne tiom multe estu kune.

Li sentis korpikon, sed nu ja – eble ŝi devas havi iom da privateco. Ili interkonsentis rerenkontiĝi merkredovespere, por kune vidi la teatraĵon “Ĉu vi jam vidis la piedsignon de l’ profeto?”.

Ili kisis, ŝi iris sian vojon, kaj li fartis malbone.

Li provis vespermanĝi, sed povis enstomakigi nur onon de la porcio.

Vespere li iris al la balo, pensante ke eble li trovos ŝin tie, malgraŭ ilia interkonsento. Jes, tie ŝi ja estis, dancante kun aliaj. Tiu vido ne plibonigis lian sanon, sed nu ja – alia kulturo, aliaj moroj. Li penis kompreni.

Li sukcesis iel kapti ŝian atenton, kaj okulpetis ke ŝi venu. Tion ŝi ne faris. Novaj perrigardaj petegoj, novaj rifuzoj. Fine tamen, ŝi venis al la tablo kaj diris:

– Ni du devas interparoli, ĉu ne?

Ili eliris kaj sidiĝis sur la motorujo de aŭto. Tie ili interparolis, sed li sentis kvazaŭ vitran muron inter ili. Ŝi ne volis akcepti ian bezonon lian de lia kunestado.

– Malsane, ŝi diris.

Kun malpleno en koro, li sola reiris al sia hotelo.

Tiun nokton li ne dormis. Lia maltrankvilo iomete malpliiĝis nur post skribado de letero, kie li provis klarigi al ŝi ekzakte kiel li sentas.

Merkredo estis ekskursa tago laŭ la kongresa programo, sed li ne mendintis ekskurson. Fakte, ŝi kaj li iom diskutintis kune iri al Bruselo, sed tiuj planoj evidente ne plu aktualis.

Sen matenmanĝi, li iris al la kongresejo – fermita.

Sen tagmanĝi, li vagadis tra la zoologia ĝardeno. Li vidis la benkon, kie ili kune sidintis sabate, interkone, interhome. Tiam, hejmsento – nun...

Sen vespermanĝi, li sencelis tra la urbo.

Du horojn antaŭ la spektaklo, li trinkis tason da kafo.

Li staris dum longa tempo antaŭ la teatro, atendante ŝin. Ŝi venis. Rezervita, kun vitreca vizaĝo.

Li hastis al ŝi, por ĉirkaŭbraki ŝin.

– Kiel vi fartas? ŝi diris. Nenio malbona, mi esperas.

Li ne sciis kion respondi.

Ili eniris. Ili sidiĝis en la salono. Li donis al ŝi sian leteron. Ŝi ricevis ĝin kaj legis.

Dum ŝia legado, lia mano elmizere serĉis ŝian. Ŝi malakceptis ĝin, kaj flustris:

– Bonvolu, mi petas ke ni ne plu agu kiel koramikoj.

Kaj lia koro haltis.

Plej vundebla estis mi, kaj la koron
per ponardo tranĉis vi ĝisradiken,
kaj demandis: ”Restas ni ja amikoj.
Ĉu vi konsentas?”

Vi ĵetis alumeton en l’ arbaro
kaj ĉar alumeto estas efemera
vi ne zorgis pri la eta, tre malforta flamo.
Vi foriris.

Sed tre seka estis la arbaro.

Sed espero estas obstina.

Dum la lastaj tagoj de la kongreso, li provis regajni ŝin. Nu, ŝi diris, post la kongreso ŝi kelkajn monatojn ĉirkaŭvojaĝos en Eŭropo, kaj eble ŝi vizitos lin en Stokholmo.

Kiam ili disiĝis, post la fermo, ŝi kisis lin. Lia koro denove ekbatis.

Sed li maltrankvilis.

Ĉu vi iam telefonos, ĉu letero iam venos?
Ĉu vi iam venos, kara? Ĉu mi iam vin revidos?

Ĉu ekzistas vi, amata? Tion eĉ mi iam dubas,
kvazaŭ eblus el mi projekcii tiel belan bildon,
belan pli ol ĉiuj beloj, ol aliaj logoj logan.

Vangoj fajras, brusto brulas, batas frenezege l' koro
kiam miaj pensoj serĉas, kiam mia amo ĉasas.
Ĉu vi aŭdas miajn pensojn? Ĉu vi konas miajn sentojn?
Ĉu de via vasta amo donas vi al mi guteton?

Mi soifas, mi malsatas, memorante la paneron
kiun donis vi al mi, por poste l' panon tuj fortiri,
la bongustan panon kiu povus min por ĉiam nutri,
se permesus, se tolerus vi ke mi la panon manĝu.

Mi malsatas, mi soifas, memorante la trinkaĵon
kiun mi apenaŭ sentis miajn lipojn malsekigi,
la trinkaĵon nutroplenan kiu min malsoifigus se
tolerus, se permesus vi ke mi ĝin daŭre trinku.

Ĉu vi iam telefonos, ĉu letero iam venos?
Ĉu vi iam venos, kara? Ĉu mi iam vin revidos?

Mi eĉ ne scias en kiu lando vi estas,
birdeto mia,
kion vi faras, kun kiuj vi estas.
Mi eĉ ne scias ĉu mi denove vidos vin,
birdeto mia,
aŭ ĉu iam venos la mesaĝo kiun mi esperas.
Mi eĉ ne scias ĉu iam denove ebligos mian vivon
via proksimeco,
birdeto mia,
aŭ ĉu mi baldaŭ...
Libere vi flugas,
birdeto mia,
kaj ne eblus por mi kunflugi
eĉ se vi permesus.
Sed tamen ĉiam,
birdeto mia,
obstine rifuzante peti permeson,
serĉas vin kaj flugas al vi,
kaj flugas kun vi,
birdeto mia,
mia ĉiama amo.

Mi ne povas telefoni, mi ne povas leterskribi,
ĉar ne konas mi la lokon kie estas mia kara.
Mi ne povas ŝin informi, mi ne povas al ŝi diri,
ke pli bone estus se ŝi min mortigis post la horoj
kiam niaj koroj renkontiĝis, kiam mi malfermis
min al ŝi por doni kaj ricevi ambaŭflankan amon,
ol ke ŝi post kelkaj horoj, kelkaj tagoj retiriĝis,
tre naive al mi diris ke ni estu nur amikoj
kaj en vastaj glacikampoj lasis min perei sola.

Mia koro antaŭ vi, amata,
malfermas sin kiel floro antaŭ la suno.

Mia koro ĉe vi, amata,
sentas sin hejme kiel abelo finfine trovanta la
siajn.

Mia koro for de vi, amata,
frostas kiel papilio kiam alproksimiĝas la aŭtuno.

Mia koro sen vi, amata,
sen la respondo de via koro,
mortas.

Foje kredas mi ke varm’ atingas min de via koro
kaj ke korpo mia vivas, kaj ke koro mia ĝojas.
Foje kredas mi ke fakte, malgraŭ ĉio, vi min amas,
ke vi donas al mi ne nur amikecon malvarmetan,
kaj mi tiam sentas ke mi povas vivi, povas spiri,
ke la koro via venkis la diablajn cerbimpulsojn
kiuj vin ordonis malgravigi, nuramikecigi,
kvazaŭ fajr’ arbara estingeblas ĉar vi sur ĝin kraĉas.

En mi kaj ĉirkaŭ mi frosto
sed kredas ke povas senti
sur miaj vangoj la molan tuŝon
de viaj manoj.

En mi kaj ĉirkaŭ mi neĝo
sed kredas ke povas senti
en mia koro la mildan kareson
de via varmo.

En mi kaj ĉirkaŭ mi morto
sed kredas ke povas senti
en mi kreskantan semon
de via amo.

En la ŝajne hejma lando, en la ŝajne hejma urbo
rifuĝinto mi jam estas, forĵetita el la hejmo.
Mia vera hejmo, koramata, estas via koro.
Tie estas la radikoj de la tutestaĵo mia.
Nur tri tagoj, nur tri noktoj, restis mi en mia
hejmo.
Poste devis mi forlasi ĝin, ĉar mi ĝin tro bezonis.
Ĉu vi kredas, ke mi iam povos ne plu varmdezire
sonĝi, revi kaj klopodi reatingi mian hejmon?
Ĉu vi kredas, ke mi iam povos ne plu teruriĝi
pri la certa frenezeco, se mi ĝin ne plu atingos?

Antaŭ malpleno mi staras
kaj en la malpleno
ie
vi.

Antaŭ malpleno mi staras
kaj la malpleno
estas
en mi.

Antaŭ malpleno mi staras
kaj antaŭ l’ malpleno
esperas
pri vi.

Ĉu vi emas, ĉu vi volas akompani min tra l’ vivo?
Ĉu kuraĝas ami, kara, vi ne nur dum plaĉaj tagoj?
Ĉu vi emas, ĉu vi volas kontraŭstari la demonojn,
de ni ambaŭ projekcioj el tavoloj plej malhelaj?
Ĉu vi emas kontraŭstari la kapricojn emoŝajnajn,
la danĝerajn volimpulsojn minacantajn nian
amon?

Aŭ ĉu tute male emas vi forlasi la kunecon,
nuramikecigi la rilaton inter niaj koroj?
Ĉu vi emas, ĉu vi volas ke kun vi mi vivos, kara,
ke ĉe vi mi fartos bone, fortos agi, fortos ami,
aŭ ke for de vi mi malrapide aŭ rapide certe
ĉesos farti, ĉesos forti, ĉesos agi, ĉesos vivi?

Mi nenion volas diri pri via vizaĝo, kara,
kvankam ĝi belas,
ĉar multaj povas vidi.

Mi nenion volas diri pri la glateco de via haŭto, kara,
kvankam ĝi plaĉas,
ĉar multaj povas tuŝi.

Sed ĉu la rigardoj de multaj penetris ĝis malantaŭ via vizaĝo, kara,
kaj vidis tie miloblan belecon?

Ĉu multaj, brulantaj post efemera tuŝo,
kvazaŭ seka arbaro post la kiso de alumeto,
komprenis ke infero kun vi
estas pli vivdona ol sola iro ĉielen?

Miaj vortoj provas sorĉi, miaj vortoj provas voki,
provas kapti vian koron, malefemerigi l’ amon,
l’ amon kiun iam sentis vi por mi, ekbruligante,
l’ amon kiu post tri tagoj kaj tri noktoj ŝanceliĝis,
kiu ne plu firme brulis, dum mi brulas
senmalkreske.

Miaj vortoj provas ligi al kor’ mia vian koron
same kiel mia koro ne plu povas senviiĝi.

Miaj vortoj... ĉu do ili povos iam nove naski,
nove krei en vi amon, en vi reciprokan senton?
Ili provas superponti la distancon inter korpoj,
la distancon inter koroj ili provas neniigi.
Ĉu pro ili eblos iam nutri min per via amo?
Ĉu per ili eblos iam vin konvinki ke mi vivu?

Nur per via amo, kara, por mi eblas farti bone.
Nur per via amo eblas forti vivi, forti agi.
La egoa forto foras, ĝi por ĉiam frakasiĝis.
Mi neniam povos diri ke mi estas mi unue.
La egoa forto mortis, ne plu vivas mi senvie.
Nur la fort’ de via amo mian vivon plu ebligos.

Nun esperas mi hezite ke la vortoj vin atingos.
Malregule kaj malforte mia kor’ ankoraŭ batas,
batas per la eta forto de l’ espero nesekura
ke la vortoj miaj povos ja konvinki vian koron.

Kiam ŝi estis en Hungario li sukcesis scii ŝian telefonnumeron tie kaj vokis. Ŝi estis same ĝentila kaj amplena kiel antaŭe. Jes, ŝi venos al Stokholmo. Ĉio en ordo.

Kaj ŝi venis. Dum unu semajno ili estis kune.

Kaj li esperis.

Post ŝia foriro li sukcesis dufoje telefoni al ŝi. La unuan fojon, en Nederlando, ĉio ankoraŭ bona; la duan fojon, en Kroatio, la 7:an de oktobro 1982, vespere...

Ŝia sinteno ŝanĝiĝis. Malĝentiliĝis. Ŝi ne volis havi plian kontakton.

Neniuj klarigoj, sed jarojn poste li eksciis:

Ŝia katalog-ario havis pliajn strofojn.

Lia ne.

kaj mi mortis
kaj mi kuŝis kaŭre
tuj apud la vitra muro
konstruita de vi
ĉirkaŭ via koro

La infano en mi
nude baraktas.

La malsana infano
envolvita en mi
volas tuŝi vin,
streĉas la manojn,
ploras senbride.

Per via neo
la vivo neas.
Pro via dorso
al mi turnita,
la vivo turnas
al mi la dorson.
Ĉar vi finfermis
la koropordon,
la vivo fermis
la pordon feran
de sia koro.
Ekstere staras mi
nudakore,
ekstere frostas mi
ne ŝirmata
de amo via,
de amo ia.

Vi logis al vi mian koron.
Plenkore mi donis al vi
la kernon de mi.

Vi ligis al vi mian kernon.
Fideme mi verŝis al vi
l’ animon de mi.

Vi logis kaj ligis – kaj poste,
vidante l’ bezonon de mi, pri vi,
vi fuĝis de mi.

Vi fuĝis de nia kuneco,
kaj poste mi kore min sentas
nur ombro de vi.

Ĉirkaŭ mi la ombroj plilongiĝas.
Mian kapon venas la malhelo.
Diskreviĝas mia cerbo lante,
pereadas mia mensa sano.

Vin mi strecas mian psikan manon.
Vin mi arde volas tuŝi, kvankam
mi neniam povas vin atingi,
kvankam mi sen vi ne povas spiri.

Nuda mia koro antaŭ vi.
Nuda mi sur frida ebenaĵo
staras senprotekte kontraŭ l’ frido,
staras senrimede en dezerto.

Nuda mi min montras antaŭ vi,
mi min senkovrilas por atingi
vian koron, se vi havus koron.

Malfacile rezigni
pri lasta espero,
pri revo pri vi.

Malfacile ne sonĝi
pri vivo kunvia,
pri amo de vi.

Malfacile akcepti
la vivon koŝmaran
ne kune kun vi.

Al vi mi min oferis.
Gustumis vi, kaj vomis.

Ŝi reiris al Brazilo. Li denove skribis al la kutima adreso, ofte. Foje li ricevis fridajn respondojn, plejofte neniujn.

Koro kontraŭ koro batas, vango serĉas vian vangon.
Via vango estas je l’ alia flanko de la tero.
Mia koro serĉas vian. Ĉu la via same serĉas?
Ĉu vi sentas kiel sentas mi la interkoran tiron?

Mano provas preni manon. Man’ preminda fortiriĝis.
Ĝin fortiris nekompreno, la demonoj de l’ blindeco.
Ĝin fortiris cerbkaprico, ne la forta, kora emo.
Mano provas preni manon, mano serĉas vane manon.
Ĉu do nura iluzi’ ke koro batas kontraŭ koro?

”Malsane”, ŝi diris.
”Malsane bezoni.
Amantoj ja estu
de unu l‘ alia
sen ligoj, sen zorgoj,
libere ŝvebantaj” –
kaj ŝvebis rapide
senzorge, enforen ŝi –

sed en mia koro
restadis la hoko,
restadis de l’ hoko
fadeno alŝia,
fadeno maldika,
apenaŭ videbla.

Do, kial zorgi?
Ja tiu fadeno
laŭ ŝi ne ekzistas
kaj se mi doloras,
mi tion nur faras
– se al ŝi ni kredu –
pro memdoloremo,

kaj ne, ĉar la hokon
ankoraŭ tiradas ŝi.

Nur dum unu posta kongreso li revidis ŝin, en Roterdamo 1988, kie ŝi amindumis al fama eldonisto antaŭ liaj propraj okuloj, kvazaŭ li ne ekzistus.

Tiam ŝi jam estis, detruinte lian psikan sanon, diplomita psikiatro.

En la sama urbo ŝi dek ok jarojn poste mortis.

En la sama urbo ŝi nun ripozas.

Sed antaŭ tio, fine de 1989, li vidis etan noticon en la revuo: ŝi edziniĝis.

Ne al la eldonisto, sed al alia viro, tiam ankoraŭ pala sed baldaŭ poste fama kiel fervora reformunto de esperanto.

Ĝuu, se vi povas, Pariso, vian
kriman ĝuon, dum Menelao ŝipojn
ŝovas en la maron, por puni vin kaj
Trojon faligi!

Ja Areso havis plezuron sian
dum tempeto kun Afrodit' perfida,
tamen fine kuŝis en pezaj ĉenoj
li, de Hefesto.

Ludu do, se eblas, Pariso, vian
kokran ludon! Tamen ne fidu, ke vi
povos dum la resto de via vivo
ĝui Helenan.

Kaj tion Pariso ne faris.

Sed ŝi, moviguntino de mil ŝipoj, ne sekvis la homeran manuskripton.

Menelao ankoraŭ vivas, kaj verkis ĉi libron.

Pariso same vivas. Li daŭre laboras por la fundamenta esperanto dum la horoj kiam oni pagas lin por tio, kaj kontraŭ ĝi en sia libera tempo.

Sed Helena, forglitinte el la manoj de Pariso sed ne reveninte al Menelao, mortis.

Solece.

Dum la plenluna tago de majo 2006, 46-jara. Kancero en la pankreaso.

Neniu apud ŝia lito.

Mi eĉ ne scias en kiu mondo vi estas,
birdeto mia,
kion vi faras, kun kiuj vi estas.
Mi eĉ ne scias ĉu miaj vortoj povas veni al vi,
birdeto mia;
malfacile iras mesaĝoj inter mondoj.
Ĉu libere vi flugas,
birdeto mia,
en feliĉa mondo,
aŭ ĉu vi estas ligita
al ploroplena?
Sed tamen ĉiam,
birdeto mia,
obstine rifuzante peti permeson,
serĉas vin kaj flugas al vi,
kaj flugas aŭ, se necese, rampas kun vi, birdeto
mia, mia ĉiama amo.

Vi unu handikapon,
laŭ viaj propraj vortoj
dum vi ankoraŭ amis,
ja havis, kaj severan:

Vi ne kapablis plori.

Kaj viaj fortaj sentoj
direktis sin internen
sub disciplinkovrilo.

Ĉu miaj propraj larmoj,
kiam vi min forlasis,
atakis vin tro forte?
Ĉu sentoj enŝlositaj
finfine vin mortigis?

Ŝakludanto oni vin nomas, morto.
False estas tamen aserti tion.
Ŝako estas ludo honesta. Vi do
ludas pokeron.

En maniko kaŝas vi viajn kartojn.
Niajn kartojn gvatas vi tre diskrete.
Vian venkon do garantias via
luda ruzemo.

Jes, eraris ŝi. Jes, kaj vero estas
ke ŝi mian vivon per ĉi eraroj
fundrenversis, ke ŝi ponarde mian
koron traboris –

sed ŝi ne meritis ke vi vizitu
ŝin en mezo de ŝia propra vivo.
Ŝin pardoni eblas por mi; neniam
vin senkulpigi.

Kion pensis vi, amata,
dum la lastaj tagoj viaj,
kiam vin kancero voris?
Jam tri jarojn ne plu estis
vi kun eksa edzo kune.
Nun solece vi kuŝadis.
Kuraciston vi rifuzis
voki, mem kuracistino –
psikiatro, kiu mian
psikon lasis en ruinoj.

Ĉu rifuzis vi mildigi
per piloloj la doloron
por ne devi plu memori?

Ĉu doloro korpa plene
okupadis viajn pensojn?
Aŭ ĉu vi vivfinmemoris?

Ĉu en mortmoment' vi spektis
en spegulo de Jamao
kie, laŭ prahinda mito,
oni vidas siajn agojn
abomenajn kaj laŭdindajn,
devigata al kompreno?

Ĉu vi vidis tie l’ spurojn
de la am’ de vi semita,
de la amo kiu sekvos
vin en ĉiuj mondoj ĉiam?

Ĉu vi min atendos transe,
ĉu vi daŭre min forpuŝos,
aŭ ĉu vi forgesis ĉion?

Voĉoj vokas, vent’ susuras,
sed el tombo nur silento.